

ESPERANTO

★ TRIUMFONTO ★

Aperas semajne, kun monataj aldonoj „Revuo“ kaj „Internacia Komercio“

Abonon ni akceptas ne por fiksita tempo (jaro, monato) sed por nombro de ET-numeroj. Oni sendu iun sumon, kaj ni liveros ET ĝis elĉerpiĝo de la sumo. Pri finiĝonta abono ni informas. Oni pagu ne per poŝtmandato, sed per ŝtataj monbiletoj en rekomendita letero. „Revuo“ kaj „Internacia Komercio“ senpage por ET-abonantoj.

La prezo de unu numero estas por la lando:

Aŭstra 1500 Kr.	Ceĥosl. 1.20 Kr.	Hungara 50 Kr.	Litova 25 Cd.	Rumana 4 Leol
Belga 0.65 Fk.	Finna 1.20 Fmk.	Itala 0.80 Lit.	Nederl. 0.15 Hfl.	Rusa 100 Gmk.
Brita 3/4 Pc.	Franca 0.60 Fk.	Japana 0.10 Jen.	Norvega 0.20 Kr.	Sveda 0.24 Kr.
Bulgara 4 Levol	Germana 300 Mk.	Jugosl. 2 Din.	Pola 400 Mk.	Svisa 0.30 Fk.
Dana 0.30 Kr.	Hispana 0.30 Pes.	Kanada 0.05 Dol.	Portug. 0.60 Esk.	U. S. A. 0.06 Dol.

Estonoj kaj Italvoj demandu la prezon ĉe sia Abonulo. — Aliaj landoj pagu egalvaloron de 0.60 Fr. Fk. aŭ 1 stampitan Respond-Kuponon.

Por Adresanĝoj ni kalkulas du numerojn de la abonkonto. Dumviva Abono kostas la prezon de 400 numeroj. Anoncoj kostas po cm² 0.10 svizan frankon (aŭ ĉe antaŭpago 150 gmk.); rabato laŭ interkonsento. Por „Internacia Komercio“ kaj specialaj numeroj speciala prezo.

FINNLANDA
FOIRO
EN
HELSINKI
ĈIUJARE
1-6. DE JULIO

Eldonantaro:
D-ro L. Zamenhof, Warszawa (Varsovio)
W. M. Page, adv., Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gili Norta, Barcelona
H. Fischer, grandindustriisto, București (Rum)
Teo Jung, Köln (Kolnio)
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bankdirektoro, Kaunas (Kovno)

Administrejo:
Horrem bei Köln, Germ.
Postĉekkonto Köln 70663, por Teo Jung, Horrem.

Redakcio:
Ĉefredaktoro: Teo Jung.
Literatura red.: Zanoni.

N-o 122 :-: Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgh, Kaunas, Köln, Paris, Warszawa :-: 4. II. 23.

Karnavalo.

En pasinta jaro ni surprizis niajn legantojn per kompleta satirplena karnavala numero, kiu ĉe la plimulto de la legantoj trovis bonegan akcepton. Tiun ĉi jaron rezignante la eldonon de karnavala numero, ni lasis nin decidigi precipe per la grando, ke ni mem vivas nunmomente meze de plej granda karnavalo. Ankaŭ sen pli detala klarigo, ni esperas, ke oni nin komprenos.

Kiel certigi la ekziston de niaj ĉefaj institucioj?

Trarigardante la rezultojn de nia preskaŭ 40-jara movado, ni devas konfesi, ke Esperanto kvankam morale gajnis por si decan postenon en la interpopolaj rilatoj, praktike tamen ĝis nun apogas sin sur bazo pli ideologia ol reala. Plej bona pruvo de ĉi tiu bedaŭrinda fakto estas la stato de niaj ĉefaj institucioj, kiuj vegetas mizere ne povante certigi al si eĉ plej modestan ekzistadon.

Kontraŭvole naskiĝas demando, ĉu ni Esperantistoj estas efektive tiel malfortaj, ke ni ne povas certigi almenaŭ la ekziston de niaj fundamentaj institucioj, aŭ ĉu ni estas tiel mallertaj, ke ni ne scias eluzi niajn efektivaĵojn fortojn? Se principe la ambaŭ supozoj estas eblaj, mi tamen opinias, ke la dua supozo estas pli verŝajna.

Cu neniam venis al vi la ideo, kial ni ne elprofitas la nedisputeblan grandan forton de la disjettita sur la tuta terglobo Esperantista armeo? Tiu ĉi ideo venis ŝajne la unuan fojon al la neforgesinda samideano Hodler, kiu kreante UEA respondis al ĝi per reala fero. Li la unua provis eluzi nian potencialan forton por celoj praktikaj. Sed bedaŭrinde la iniciato de Hodler pro malfavoraj kondiĉoj ne eliris el sia embria periodo kaj ĝis nun apogas sin nur sur bazo ideologia.

Cu estas eble aŭ ĉu venis tempo surpaŝi pli larĝan arenon de agado? Cu estas eble hodiaŭ forlasi la ĝisnunajn diletantajn kadrojn de reciproka servopreteco kaj pensi pri organizo de seriozaj interpopolaj rilatoj de negoco?

La praktikoj montras, ke la bazo, sur kiu staras UEA kaj nia CO, ne povas certigi illan ekzistadon. Oni devas nepre serĉi novajn vojojn por antaŭenpuŝi nian aferon kaj doni eblon de daŭra

ekzisto al niaj ĉefaj institucioj. Serĉante simile al aliaj tiun ĉi vojon, mi haltis okaze ĉe ideo, kiu ŝajnis al mi pridiskutinda. Kvankam mi mem ne estas financisto, mia ideo apogas sin sur pure komercaj kalkuloj, kiuj post preparolo kun varsoviaj komercistoj-samideanoj montriĝis ne nur realigeblaj sed ankaŭ realigindaj.

La hodiaŭaĵa nenormalaj ekonomiaj vivkondiĉoj de landoj, disŝiritaj komercaj interpopolaj rilatoj, malapero de malnovaj kaj apero de novaj firmoj, nenormalaj valutaj cirkonstancoj naskis tian haŭson, ke estas tute natura la celado krei novajn pontojn inter la dispecigitaj homaro. Tion jam eksentis eĉ tiel ŝajne nepraktikaj homoj kiel Esperantistoj, kaj dank' al tio ni vidas en niaj gazetoj multenombrajn anoncojn de Esperantaj agentejoj proponantaj sian interperon.

Tiu ĉi reflekso de sana penso havas tamen gravan mankon, — ke ĝi apogas sin sur tute privata kaj ofte diletanta iniciato.

Mia projekto celas reguligi tiun ĉi principo bonan ideon kaj doni al ĝi fortan internacian fundamenton.

Jen la ĉefaj principoj, sur kiuj laŭ mia opinio devas esti konstruita la Esperantaj agentejoj:

1. En ĉiu lando (komence en ĉefaj kaj poste en provincaj urboj) devas fondiĝi tiel nomataj Esperantaj Agentejoj apogitaj sur forta financa bazo, kiu povos konsisti ne nur el Esperantistaj kapitaloj.
2. La agado de tiuj ĉi agentejoj devas koncerni interperojn en ĉiuj senescepte rilatoj, profesiaj, komercaj, sciencaj ktp.
3. Ĉiu agentejo prezentas parton de la tutmonda ligo de agentejoj, sed samtempe estas organiza finance memstara. Tiu ĉi kondiĉo estas necesa por certigi al la agentejoj sendepandan evoluon sen komplikita centraliza sistemo.
4. La agentejoj ellaboras komunan unuforman skemon de funkciado, tarifon de peradoj, formon de reciproka interrilato ktp.
5. La ligo de agentejoj aperigas kune grandan periodan komercan ĵurnalon nepre necesan por tiuspecaj rilatoj.
6. De la komerciturno (debito) la agentejoj devigas sin interkonsente oferi certan procenton por subteno de niaj ĉefaj institucioj de propagando.

Jen la plej gravaj punktoj, sur kiuj laŭ mia opinio devas esti konstruita la tiel necesaj por hodiaŭa tempo interlandaj komercaj agentejoj.

Tio, por kio aliaj devus oferi jarojn kaj grandegajn laborojn por fondi en diversaj landoj samspecajn entreprenojn, ni Esperantistoj povos efektiviĝi tre facile dank' al la granda aro de samideanoj disjettitaj sur la tuta terglobo.

Per la aranĝo de tiaj agentejoj ni gajnos jenon:

1. Ni enkondukos plej efikan formon de propagando, montrante al la mondo, ke Esperanto estas jam efektive lingvo internacia praktike uzata.
2. Ni kreas eblon subteni materiale niajn instituciojn.
3. Ni fondos grandan organon pure komercan, kiu povos utili al ĉiu komercisto.
4. Niaj laboroj kaj kapitaloj estos uzataj ne nur ideo, sed ankaŭ profite, ĉar la entreprenoj havas ĉiujn ŝancojn de prospero.

Nun naskiĝas demando, kiamaniere realigi la projekton? Mi elektis la vojon de oficiala publikigo de mia projekto. Komprenoble, tio ĉi tute ne forigas alian vojon — per privata interkonsentado kun diversaj landoj. Varsoviaj samideanoj-specialistoj post konatiĝo kun tiu ĉi projekto deklaris sin pretaj tuj alpaŝi al ĝia realigo. Se la projekto trovos aprobon almenaŭ en 3-4 ĉefaj landoj, la fundamento estos konstruita. La reston kompletigos la kunveturo de la reprezentantoj de tiuj ĉi agentejoj. La kunveturo povos okazi aŭ dum la Venezia Konferenco aŭ eĉ pli frue en iu ajn pli oportuna loko en Eŭropo.

Ĉar la afero min persone interesas pro sia granda valoro por propagando de nia ideo, mi volonte prenis sur min laŭ la propono de varsoviaj iniciatintoj la peron en la konstruo de la tuta organizo. Do ĉiuj, kiujn tiu ĉi projekto allogas almenaŭ principe, bonvolu turni sin al mi. Se post unu monato la projekto ne efektiviĝos sur la vojo proponata de mi, la varsoviaj iniciatintoj provos realigi ĝin per privata interkonsentado.

Varsovio, Polujo,
Marszalkowska 128.

D-ro Leono Zamenhof.

Rim. de red. Ni publikigas tiun ĉi projekton sen komento kaj petas kompetentajn samideanojn esprimi pri ĝi sian sinceran opinionon ankaŭ publike, ĉar la temo estas grava. Al la iniciatintoj ni konsilas ne tro urĝigi la aferon kaj atendi almenaŭ ĝis post la Konferenco de Venezia. Unu monato ŝajnas al ni nepre tro mallonga tempo por la realigo de tia projekto.

Zamenhofa Monumento.

Konkurso.
Protokolo de la Kunveno de la Loka Varsovia Monumenta Komitato, okazinta la 17.9.1922.

Ĉeestis: S-oj Leo Belmont, Stan. Essigman, Kenŝicki, D-ro I. Krenicki, J. Litauer, A. Oberroman, Ing. I. Tejchfeld.

Prezidis: D-ro W. Robin.

S-o Ing. Tejchfeld komunikas, ke la en la pola gazetaro dum julio anoncita konkurso por projektoj de la Zamenhofa Monumento bone sukcesis. Estis alsenditaj 18 projektoj de diversurbaj konkurantoj, inter kiuj kelkaj tre belaj. La ĵugantaro kolektiĝis du semajnojn antaŭe kaj konsistis el s-oj Szczepkowski, Ostrowski, Slugscki (artistoj-skulptistoj) kaj s-o Ing. Tejchfeld (delegito de la Loka Monum. Kom.); la dua delegito de la L.M.K., prof. Bujwid, ne povis ĉeesti. La decido de la ĵugantaro estas jena: La I-an premion devas ricevi la projekto kun devizo „Spero“; la II-an premion ricevas la projekto kun devizo „5 partoj de la mondo“. Aŭtoro de la I-a premio montriĝis post malfermo de la koverto s-o M. Lubelski, arkskulptisto el Poznań, — de la II-a projekto s-o Breyer, arkskulptisto el Varsovio. Krom tio la ĵugantaro distingis ankoraŭ 2 projektojn: 1. „Obelisko kun Arbo“, 2. „Aljuĝitaj Anĝeloj“, kaj opinias dezirinda, ke tiuj ĉi du lastaj projektoj ankaŭ ricevu premiojn.

Prof. Bujwid, reveninte Varsoviajn, ne tute konsentis kun la opinio de ceteraj kvar ĵugantoj kaj esprimis deziron, ke la I-an premion devas ricevi aŭtoro de projekto „5 partoj de la mondo“, al kiu estis juĝita la II-a premio. Krom tio prof. Bujwid distingis tri aliajn projektojn, nome 1. „Aglon“, 2. „Sciencon“, 3. „Verdan Stelon“. La familio de la Majstro vidis ĉiujn projektojn kaj lasis la definitivajn decidojn al la Monum. Kom. Kelkaj komitatanoj fine distingis ankaŭ la projekton sub la devizo „Babela Turo“. Tiamaniere ni havis inter la 18 alsenditaj projektoj 2 premilajn kaj 6 distingitajn de artistoj kaj komitatanoj.

Post la raporto de ing. Tejchfeld kaj diskuto la Loka Monumenta Komitato unuanime decidis: 1. aljuĝi la I-an premion al la projekto „Spero“ kaj pagi al ĝia aŭtoro, s-o M. Lubelski, la £ 12 sterlingajn, 2. aljuĝi la II-an premion al la projekto „5 partoj de la mondo“ kaj pagi al ĝia aŭtoro, s-o Breyer, la £ 6 sterlingajn, 3. ne aljuĝi

Se la redaktoro dancas... aŭ: La fantomo en la novjara nokto.

Kara sinjoro redaktoro!

Ne koleru, ke mi tiel neatendite kaj eĉ sen adiaŭo forlasis vian gastaman domon. Ĉar mi sentas, ke mi baldaŭ al vi ĉitirilitan senkulpigon, mi penos klarigi la aferon kaj rakonti al vi almenaŭ tiom, pri kio mi ankoraŭ konscias en mia konfuzita kapo.

Kun ĝojo mi estis akceptinta vian afablan inviton travivi la lastajn horojn de l' finiĝonta jaro en via ŝatata kuneŝtado. Vi scias, ke mi rifuzis vian kroman inviton viziti kun vi la „silvestran balon“, ĉar mi ne ŝatas danci, t. e. mi ne povas; vi scias, ke vi pro tio komode sidigis min en vian redaktoran ĉambrojn, por ke mi tie ĝisatendu la jarkomencigon; vi scias, ke vi poste forlasis min, dezirante al mi jam antaŭe feliĉan novjaron. Sed kio plue okazis en tiu nokto en via ĉambro, pri tio vi tute ne havas imagon. Aŭ eble vi havis imagon, eble vi tute intence instalas min en la redakciejo, pensante: Ho jes, li estas la plej taŭga homo por preni sur sin la malfacilan taskon anstataŭigi min en la pli malpli agrabla afero, li havas sufiĉe da spertoj je tiaj danĝeraj eksperimentoj. Ho, vi fiulo! Sed mi raportu.

Post kiam la pordo fermiĝis post vi, mi sidigis min plej komforte en vian apogan seĝon antaŭ la redakcia tablo, permesis al mi cigaron el la kestero, kiun vi afable estis metinta je mia dispono. Hm, ĝi ne estis malbona; se la punĉo, kies bonodoraj vaporspiralajoj invite allogis, estas tiel same bonega, mi pensis, tiuokaze mi ne havos kaŭzon por plendi. „Ha, mi ne seniluziĝis,“ mi

devis konfesi post la unua glaso. Prijuĝante laŭ la cigaroj kaj la punĉo la staton de via ET-a entrepreno, — ĝi nepre prosperas. Meditante pri tio mi brave atakis la punĉojn, kies enhavo baldaŭ dubeme malpliigis. Sed tiom pli boniĝis mia bonhumoro. Kaj ne malmulte kunhelpis la agrabla sento, ke ĉi ĉio ne kostis iom; bedaŭrinde oni nur malofte renkontas tiel malegostajn „oferemajn“ homojn. — Agrabla varmo trafuis mian tutan korpon. Estas certe ŝatinda okupiĝo esti redaktoro, precipe kiam oni sidas tiel komode antaŭ sia skribotablo. Ne koleru, ke mi lomete traesploris la vian, ĉar mi estas scivolema kaj videma. Sed bedaŭrinde ĉio estis skribita en Esperanto, sed en tre stranga Esperanto, ŝajnis al mi; mi ne sukcesis deĉifri multon, kaj vortaron mi neniel trovis. Ĉu vi eble ne bezonas tion?

Jen interesis min verde kadrumita fotografajo sur via skribotablo. La persono ŝajnis iom konata al mi. Kie mi do jam vidis ĉi tiun vizaĝon? Ho, mi stultulo! Tio ja estas la Majstro. Mi enverŝis novan glason de via bonega punĉo.

„Al via sano, kara Majstro!“ mi diris levante mian glason, kaj li milde alridetis min.

„Vi certe permesas, ke ni lomete kunestas, ĉar la ŝatata ĉefredaktoro forestas por danci. Ja, ja, li dancas. Ĉu Esperantisto bezonas danci, precipe redaktoro, vi demandas? Ho, kial ne, Majstro, tio devas esti agrabla plezuro. Ĉu ni faru provon kune?“

Mi prenis la portreton de sur la tablo kaj rondsaltetis falfante la plej novan Esperantovalson. Ne malutilis, ke kelkaj seĝoj renversiĝis kaj ke mi preskaŭ frakasis la punĉojn. Sed mi baldaŭ laciĝis, eble mi estas jam lomete tro maljuna por tio. Ŝvitante mi malleviĝis sur la seĝon. Ho, kiel la procedo varmigiĝis kaj soifigis min! Ho, kiel refreŝiga kaj fortodona estis la punĉo!

Jen dekdu akraj sonoj de la proksima preĝejo turo. De ekstere eksonis salutaĵoj kaj ekkriis raŭkaj voĉoj: „Feliĉan novjaron, feliĉan novjaron!“ Mi eksaltis. Komprenoble okazis por trinki, — unu glason je la memoro de l' Majstro, duan je mia propra sano, trian je la via kaj je la prospero de nia Esperanto.

Subite mi aŭdis de le strangan tumulteton. Ĝi ŝajnis elveni el iu ŝranko. Jen denove la brueto, kaj samtempe aŭdiĝis strangaj voĉoj ŝajne diskutantaj. Kaj jen, tute klare mi povis kompreni:

„Ni ne plu eltenas! Tu bi or not tu bi.“

Kun krako malfermiĝis ŝrankpordo kaj elkreskis stranga estaĵo kun kvadrata kapo kaj ventro, senfine longaj kaj timige maldikaj brakoj kaj kruroj. Ĝin sekvis tuj kvin, ses, sep samaj figuroj, kun poste pli, parte malpli dikaj ventroj, sur kiuj mi legis la vortojn:

To be or not to be.

La longkruruloj vigle gestumis per staj longaj brakoj kaj kriegis konstante:

„Ni ne plu eltenas; tu bi or not tu bi.“

lomete konataj ŝajnis al mi la vortoj sur la ventro, kie mi do legis ilin? Ha, jes, tio ja estis la surskribo de kelkaj ET-aj artikoloj. Sed ĉar mi ne scipovas la meksikan lingvon, mi ĝis nun ne scias, ke oni pronuncas la vortojn alie ol oni skribas ilin. Ke mi do ankaŭ sciu ilian signifon!

Jen la fantomoj ekvidis min. Ho, kiel iliaj okuloj kolere ekbrilis, kiel furioze ili per siaj brakoj frapis la aeron, kiam ili kontraŭkuregis min. „Impertinentulo, senhontulo!“ ili kriegis kaj puŝis min en la ripojn, pikis min per siaj pintaj fingroj kaj tiris min je la haroj.

„Ho ve!“ mi kriis, „Haltu! Ne tiel maldelikate, mi petas, lasu almenaŭ miajn harojn, mi havas nur ĉi tiujn malmultajn! Kion vi deziras de mi?“

„Malliberiĝi ni volas; pro kio vi tiel longtempe enfermas nin? Ni ne plu toleros tion.“

„Mi tute ne komprenas vin, viaj moŝtoj,“ mi timeme balbutis.

„Vi ne komprenas? Hontu! Ĉu ni eble estas malpli valoraj ol la aliaj artikoloj, kiujn vi reprecis en via ĵurnalo? Pro kio vi ne zorgas ankaŭ por nia afero? Ni eble enhavas multe pli saĝajn kaj pli utilajn pensojn ol ili; pro kio vi ne lasas nin diri ankaŭ nian opinionon pri ĉi tiu temo? Vi senhonta firedaktoro!“

„Ho, mi ja tute ne estas la redaktoro,“ mi malpezigite rediris, „la redaktoro ne ĉeestas, li dancas.“

„Kiel, li dancas? Ĉu redaktoro bezonas danci? He?“

„Mi ne scias.“

„Ne kredu lin, li estas tro malkuraĝa por diri la veron!“ Kaj ree ili furioze tirusis miajn harojn: „Ĉu vi nun volas reprecis nin aŭ ĉu ne?“

„Kion signifas ĉi tiu disputo, sinjoroj? Pactigu do! Militadon neniam plu!“

Agrable mildaj voĉoj diris tion, kaj malkovrigis el la punĉovaporoj ĉarmaj junulinoj, unu post la alia. *Kultura Revuo, Komercia Revuo, Teknika Revuo, Literatura Revuo* estis skribite sur iliaj flugantaj rubandoj. Kaj jen koboldo en areklena vestaĵo, farante frenezajn kapriolojn — la *Humora Revuo*. Kaj fine, majeste marŝante, kun dika libro en la mano, okultvitro sur la nazo, la *Scienca Revuo*. Ili detenis de mi la longbrakulojn kaj riverencis respektive: „Ah, jen, la anoncita Revuoj,“ mi murmuris. „Kiel beletaj!“ „Saluton al vi, patro!“ ili ekparolis al mi.

III-an kaj IV-an premiojn pro manko de mono, 4. speciale menciis la 6 ceterajn projektojn, nome: „Obeliskon kun arbo“, „Aljurgitajn Anĝelojn“, „Aglon“, „Sciencon“, „Verdan stelon“ kaj „Babelan turon“ kiel distingitajn de la loka komitato, 5. rajtigis la Prezidanton de la loka komitato, D-ron Robin pagi al la artistoj-skulptistoj Lubelski kaj Breyer la premiojn kaj ricevi de ili koncernajn kvitancojn, 6. Anonci la rezulton de la konkurso en polaj ĵurnaloj kaj Esperantaj gazetoj.

La Loka Komitato komunikas nun, ke ĉar inter la distingitaj projektoj troviĝas kelkaj belaj, kiuj eble ne taŭgas por la tombejo, sed estus tre konvenaj por publikaj placoj, estus domaĝe, se ili perdiĝus por la Esperantistaro. Ni devas klopodi, ke iliaj aŭtoroj donu al ni la rajton ilin reprodukti kaj prezenti la fotografiojn al la samideanaro. Tial la Kom. decidis turni sin al la aŭtoroj de „distingitaj projektoj“ kun peto, ke ili permesu ilin reprodukti.

La Loka Kom. decidis ekspozicii ĉiujn premiitajn kaj distingitajn projektojn (entiute 8) en la fama Varsovia konstanta Ekspozicio de pentraĵoj kaj skulptaĵoj, por ke la Varsovia samideanaro povu ilin vidi kaj esprimi sian opinion. Fine oni decidis postuli de la aŭtoroj de la 2 premiitaj verkoj ĉiujn necesajn informojn, celantajn la praktikan flankon de la starigo de monumento, t. e. pri la kosto, materialo, tempo necesa k. t. p. Tiujn informojn la loka Varsovia Kom. prezentos al la Organiza Kom. por definitiva decido.

Notoj pri la Protokolo kaj la Kupon-Kartoj.

La supra protokolo devis aperi en la Esperanta gazeto jam en oktobro, sed pro la fakto, ke la kupon-kartoj, kiuj estis promesitaj por la Helsinkia Kongreso, ne alvenis eĉ en oktobro, la Organiza Komitato prokrastis la protokolon ĝis la fina apero de la kupon-kartoj.

Post longa kaj ĉagreniga korespondado — ili estis menditaj en Leipzig — la kupon-kartoj fine alvenis de la presisto nur antaŭ nelonge. Kvankam ne tute kontentiga kaj ne tute laŭ la celo kaj deziro de la Organiza Komitato ili tamen estas pretaj por utiligo de la monokolektantoj. La Organiza Komitato esperas, ke tiu klarigo sufiĉos por senkulpiĝi ĝin pro tiu longa prokrasto.

Agentoj kaj aliaj, kiuj jam postulis la kupon-kartojn por helpi en la monokolekto, devas esti nun en posedo de la kupon-kartoj kaj tiuj, kiuj ne ankoraŭ postulis ilin, estas petataj skribi nun al la hon. sekr. de la Org. Kom. en Liverpool.

Por la Org. Kom.
J. D. Applebaum, 11 Mayville Rd.,
Mossley Hill, Liverpool, Anglujo.

Esperanto en la Brazilia Parlamento.

D-ro José Augusto, unua sekretario de la Deputitara Ĉambro, prezentis, la 4-an Decembro, la jenan projekton:

„La Nacia Parlamento decidas:

Art. 1. — Ĉiujare, en la Kolegio Petro II kaj en ĉiuj instruoj, kie okazos ekzamenoj de preparaj studoj, estos ankaŭ ekzameno de la helpa internacia lingvo Esperanto, kiu obeos al la samaj formalajoj de la ceteraj ekzamenoj de vivantaj lingvoj.

Art. 2. — La atesto de ekzameno de Esperanto egalvaloros, por la matriculo en la superaj kursoj de la Respubliko, al tiuj akiritaj de la lernantoj, kiuj preferas fari ekzamenon de la germana lingvo.“

Tiu projekto estas sendita al la Instruada Komitato, kiu en sia unua kunveno aprobis la bonegan raporton D-ro Tavares Cavalcanti, tute favora al la projekto.

Oni esperas, ke ĝis la fino de l' nuna jaro ĝi estos aprobita de la Deputitara Ĉambro kaj sendita al la Senato.

„Vi eraras, sinjoroj, mi ne estas via patro, via patro dancas.“

„Domaĝe, ni volis danki al li pro tio, ke li kreis nin.“

„Ha ha, ke li kreis vin!“ intermiksas sin akraj voĉoj, kaj alproksimiĝis novaj fantomoj. „Ni tute ne bezonas vin, nenecesaj vi estas, nenian ekzistojn vi havas.“

„Kiu estas vi?“

„Ni mem estas Revuoj, memstarantaj specialaj Esperanto-gazetoj. Ni ne toleros, ke vi forpuŝos nin.“

Kaj ili kolere atakis la junulojn, kiuj energie defendis sin. Kun miro mi observis la batalon. Sed jen la „memstarantaj“ ekvidis min.

„Ha, tie li ja estas, la pretendema redaktoro! Pro kio vi celas pereigi nin?“

„Lasu min, estimataj sinjoroj, mi ja ne estas la redaktoro, la redaktoro dancas.“

„Vi mensogas; batu lin, li volas malestigi nin! Ankaŭ ni volas vivi.“

„Sed zorgu, ke vi iun tagon ne mortu, kiel ni.“

Malhelaj, malĝojaj kreitaĵoj en nigraj vestaĵoj malkovriĝas el la fumo de mia cigaro, kiun mi pro teruro lasis terenfalli.

„Morti, kiel ni, la 123 mortintoj,“ ili profunde voĉe ripetis.

Mi frostotremis; sed jam aperis novaj, kvadratformaj estaĵoj. Estis skribite sur iliaj ventroj:

„Pola Esperantisto“, „Brita Esperantisto“, „Franca Esperantisto“, „Germana Esperantisto“ — ho, mi ne scias, kiom pli trembrilis antaŭ miaj okuloj da diversnaciaj „Esperantistoj“.

„Ankaŭ nin li volas malestigi,“ ili kriegis kaj svingis minace la pugnoj kontraŭ min. „Pro kio vi reprezas en via gazeto artikolojn, kiuj celas nian malaperigon?“

Ne ridu!

Estimata Esperanto Triumfonta!

Ne ridu pro tio, ke mi diris „Estimata“; mi ne ŝatas la tradiciojn, kaj estas nepre tradicio, ke oni uzas tiun ĉi adjektivon nur je personaj rilatoj. Laŭ mia vidpunkto ankaŭ gazeto povas iĝi estimata, se ĝi estimindajn kvalitojn akiris.

Mi opinias, ke mi konvinkis vin, ke mi rajte uzas tiun esprimon; almenaŭ mi ne nur al ulo diras estimata, sed ankaŭ al oĝo, se mi konjektas, ĝin estiminda. La Esperantistoj estas progresemuloj, kaj se iu kaŭzo ĝin postulas, ili devas mal-estime forĵeti kutimojn tradiciajn.

Nu! estimata gazeto, antaŭ ĉio mi petas vian pardonon. Bonvolu pardonu, ke mi ne subtenis vin je via naskiĝo; mi dirus al vi ankaŭ la kaŭzon, aŭ la kaŭzojn, sed mi estas certa, ke vi ne estas scivola. Tamen estu konvinkata, ke mi tre ĝojas vidante vian vivkapablecon malgraŭ tio, ke mi ne subtenis vin. Samtempe ni petas vin, akceptu mian plifortigilon, t. e. mian abonon; farigu mia abono ero da nutraĵo, kiu helpas virigi la kreskantan infanon.

La fortojn, kiujn mi ĝis nun elspezis pro naciaj gazetoj, de nun mi donacos tiujn fortojn al vi, ĉar vi fariĝis internacia. Tiun decidon plifortigis ĉirkonstanco, t. e. ke antaŭ kelkaj monatoj mi ricevis de samlandano novaperintan gazeton e-



Esperanta Grupo de Sabadell (Hispanujo) dum ekskurso al la marborda urbeto Vilanova y Geltru. La bildo montras la grupon en Vilanova antaŭ la muzeo-biblioteko nomata „Muzeo Balager“.

estis senlaca pionira laboro. — Kaj nun ni kunigu niajn pensojn: „Kiom da frazoj por unu mizera abono!“

E. en P. (Slovakio).

Rim. de Red. — Ĉar la skribinto aludas la gazetaran demandon, ni ripetis nian tiurilatan opinion. Pro tio, ke la Esp. movado estas esence Internacia, unua devo de ĉiu serioza Esperantisto estas aliĝi al Internacia Esp. asocio (UEA) kaj aboni internacian ĵurnalon (ET). La aliĝo al nacia societo kaj abono de nacia Esp. gazeto estas rekomendindaj, sed venas nur je dua vico. Kelkaj samideanoj pledas por tuta forigo de naciaj Esp. organoj. Tiun proponon ni ne konvencas, malgraŭ nia emo al koncentriĝo, ĉar ankaŭ la koncentriĝo ne havas siajn limojn. Sed por ĉiu lando nepre sufiĉas unu nacia organo, kiu kompreneble devas esti redaktata en la nacia lingvo, ne en Esperanto; kaj en landoj, kie la movado estas malforta, aŭ entute en malgrandaj landoj, sufiĉas la eldonado de flugfolioj kiuj — laŭsperte — estas malpli multekostaj kaj pli efikaj ol propra organo.

„Kaj eĉ maljusta li estas.“ Infanaĵo voĉoj, plorantaj aŭdiĝis. Mi ne scias, de kie ili venis, sed nun staris antaŭ mi kelkdekoj da infanoj, tenante en siaj manoj folietojn kun la surskribo:

Por la Konkurso de Infanoj.

Ili frofis siajn okulojn kaj plendis:

„Pro kio mi ne ekhavis premion? Ĉu mia historieto ne estas tiel same bona kiel tiu de Anjo?“ „Kaj la mia malpli taŭga ol tiu de Karolo?“ „Kaj la mia ne tiel samvalora kiel tiu de Linjo.“ „Kaj mia... la mia?“ Kelkdekoj da infanaĵo nomoj trafis miajn orelojn, kaj same tiom da manoj etendis al mi la manuskriptojn.

„Ankaŭ mi fervore lernis Esperanton. Pro kio vi ne zorgas, ke ankaŭ nia nomo aperu en via gazeto?“

„Ĉar vi ankoraŭ ne tiel bone scipovas Esperanton kiel ni.“ Denove infanetoj elkreskis el la planko. Ĉiu el ili tenis libron en la manoj.

„Jen, kion mi gajnis,“ ili turnis sin al mi, „ĉu ni laŭfleĝu ion, sinjoro redaktoro?“

„Pro Dio, turnu vin al s-o van Heek, la aranĝinto de l' konkursoj, se vi volas plendi aŭ danki; la afero tute ne koncernas min; cetere mi ne estas la redaktoro, la redaktoro dancas.“

„Li dancas? — Ho, jes, danci, danci!“

Kaj ili prenis sin reciproke ĉe la manoj kaj komencis rondsalti ĉirkaŭ mi. „Ni dancu, ni dancu!“ ili kriis. Nun ĉiuj aliaj kunsaltis kaj kunkriegis — la longkruruloj, la revuoj, la memstarantoj, la mortintoj, la „Esperantistoj“ — ĉiuj, ĉiuj dancis, per groteskaj, frenezaj movoj saltante en la ĉambro. Ankaŭ min ili tiris en la rondon; vole nevole mi devis kunfari, kaj aperis konstante novaj figuroj, grandaj — malgrandaj, dikaj — maldikaj, longaj kaj larĝaj, unu pli groteska ol la alia: la Mallongaj Esp. Sciigoj, la

Pri la Universalaj Kongresoj.

La Universala Kongreso estas la plej grava fakto interna de Esperantismo, la plej alloga kaj efika propaganda rimedo, la plej bela certigo de nia sankta Interna ideo.

Mi opinias, ke du aferojn la kongresaj komitatoj devas ĉefe prizorgi, por ke tia grandioza okazaĵo ne perdu sian valoron:

1. Atentigon kaj partoprenon de la oficialaj rondoj, registaroj, intelektularo, gazetaro (precipe ĉeesto de redaktoroj kaj korespondantoj) de ĉiulandaj gravaj ĵurnaloj estas utila al nia movado, ĉar la malfacileco de nia progreso estas nur sekvo de la ĝenerala persista nescio pri la Esperanta vivo kaj la progreso mem).

2. Ebligon al ĉiuj samideanoj partopreni kaj ĝui tiun plej grandan familian feston. Bedaŭrinde tre multaj dezirantoj devas forlasi tiun intencion pro financaj malfacilaĵoj. La kongresaj komitatoj speciale devas okupi sin pri tiu demando: pli bone estas limigi la eksterordinarajn amuzojn, pli bone estas malpli bruegi per festenoj, spektakloj, ekskursoj, ol malzorgi kaj malhelpi la grandamasan partoprenon kaj la plej vastan diskonigon.

Kontraŭe la komitatoj kelkvoje sekvas alian vojon. Ŝajnas al mi, ekzemple, ke la plialtigo de la kotizoj por la XV-a estas troigita: la kongres-kotizo estas preskaŭ duobligita, rilate al tiu de la antaŭa kongreso, kiu tamen okazis en preskaŭ sama socia stato. Same erara estas, laŭ mi, la tute nova nenligo de la favorotizoj por familianoj; mi ankaŭ trovas troigita kaj ne tute pravigebla la kotizan diferencon de unu lando al la alia kaj severegaj kelkajn pagkondiĉojn.

Ni ne forgesu, ke la Esperantistoj vivas plejparte per sia laboro, ke la nuntempaj malfacilaĵoj estas ĉie teruraj, ke la Universalaj Kongresoj aŭ devus celi precipe, se ne ekskuzive, la plenigajn renkonton kaj fratiĝon de tiuj spiritoj sur la vojo de la praktika vivo de Esperantismo!

F. C.

Framasonoj.

Patronada Esperantista Komitato Framasona Paris.

Kreita 20. marto 1922 de kelkaj samideanoj Majstroj, tiu organizaĵo estis lokigita sub la prezidanteco de la tri grandaj majstroj de la tri obediencoj francaj. Tio al ĝi donis tuj grandan forton kaj moralan apogon.

Al la du loĝitoj fonditaj nun estas aliĝintaj 27 loĝitoj el Parizo, el la provinco, el la kolonioj, unu ĉapitro el la kolonioj kaj la Frata Grupo de la Metallurgio, kiu kalkulas tre grandan nombron da membroj.

Partoprenante la komisionon de la deziresprimoj nia samideano Méras unuvoĉe voĉdonis la jenan proponon:

anoncoj, la anoncoj, rimarkindaĵoj el la Parolejo ktp. En via bala certe ne estis pli gaja kaj pli miksitaj ĉeestantaro. Eĉ „balpoŝto“ ne mankis; tiun prizorgis la „korespondantoj“; flugadis poŝtkartoj, leteroj, gazetoj kaj „Esperantaĵoj“ de unu angulo al la alia. Kaj mi enmeze de ĉi tiu haoso — turnata, ŝovata, puŝata, tirata ŝvitante kaj spiregante. „Flugfolioj“ trafis zumante la aeron, de la plafono fluets konstante verdaj steletoj, kroĉiĝis je la portretoj, bildoj kaj kovris mian kapon, miajn vestaĵojn, la meblojn kaj la plankon. Estis freneziga bruo, kanto, manplaudado. Eĉ la du skribmaŝinoj senhalte klakis: tak, tak, tak, tak, tak.

Sed subite elŝeliĝis el la vandoj dek, dekkvin, dudek figurajoj kun tiel strangaj formoj, ke pro teruro mi haltis en la dancado. Ili konsistis nur el du, tri literoj: LK, LKK, CK, KR, TEKA, GEA, UEA, CO ktp. Per larĝaj saltitoj ili alproksimiĝis kaj elŝiris min per mia barbo el la cirklo.

„Ĉu vi konas nin?“ ili kokokrisis.

„Ne, mi ne havas la honoron. Ve, miaj barbaroj!“

„He, vi ne konas nin? Vi ne konas la mallongigojn, kiujn vi ĉiokaze reprezas en via gazeto? Se vi mem ne konas nin, kiel vi pretendas, ke la legantoj vin komprenu? Mirinda redaktoro vi ja estas.“

„Senkulpigu, viaj mostoj, mi ne estas la re...“

„Li entute ne scias ion, ĉi tiu homaĉo, alle li jam de longe estus respondinta al ni.“

El la „leterkestio“, kiu pendis sur la muro, venis ĉi tiuj vortoj, kaj elsaltis malgrandaj koboldoj.

„Ho, oni ja sufokiĝas en la malvasta kestio, respondu fine, por ke ni raportu al niaj sendintoj:

Enkonduko de Esperanto en la tutan francan framasaron por la internaciaj rilatoj por la fremdaj loĝitoj, kiuj ne uzas la francan lingvon.

Starigo de senpagaj Esperantaj kursoj ĉe la Granda Oriento de Francujo je la samaj kondiĉoj kiel la vivantaj lingvoj.

Protesto kontraŭ la ĉirkulero de la Ministro de la Publika Instruado Bérard, malpermesanta la propagandon kaj la instruadon de Esperanto en la lernejoj ŝtataj.

Tiu deziresprimoj estis prezentita kaj energie pledita de nia samideano Méras antaŭ la ĉeestantaro, sed la Ordena Konsilantaro de la Granda Oriento petis insiste, ke tiu demando, ne sufiĉe konata kaj ne pristudata de la framasono, estu resendata al ĝia pristudo.

La komitato elektis komisionon por viziti la Prezidanton de la Respublika Komitato de la Komercio, de la Industrio kaj de la Kampkulturo, pri la ĉirkulero de s-o Bérard.

Per la klopodoj de nia komitato P. E. K. F. ni sukcesis havigi kun la prezidanto de la franca ministara konsilantaro ekstraktadojn pri propagando favore al Francujo, eksterlande pere de la framasono kaj Esperantistaro. Li faris verdire rezervojn, dirante, ke tiu studado nur estas okaza kaj ne povas ricevi la formon de kuraĝigo oficiala por la disvastigo de Esperanto.

Malfeliĉe nia Komitato estis funebre ĝita de la morto de kelkaj el niaj plej sindonemaj eminentuloj, inter kiuj: la senatano Lucien Cornet, s-o de Marcel Sembat, s-o Duguise.

Al iliaj familioj ni sendis niajn kondolencojn kaj hodiaŭ ni sendas al tiuj karaj mortintoj nian plej koraŭtan memoron.

Ni esperu, ke 1923 alportos al nia Esperantista framasona movado ankoraŭ plej bonajn sukcesojn.

La ĝenerala sekretario de P. E. K. F.
Léon Méras.

Mallongaj Esp. Sciigoj.

Nederlando.

En 's-Gravenhage la Esp. Societo „Fine ĝi Venkos“ okazigis intiman festkunvenon la 24. jan. por siaj anoj. En bela salono la Esperantistoj interkonatiĝis, grupiĝante ĉirkaŭ tabloj, gaje ornamitaj de vazetoj kun floroj, el kiuj, superiris Esperantaj flagetoj. Post komuna kanto de nia himno, mandolinorkestro pligrandigis la ĝojon.

F-ino Boon deklamis kelkajn malnovajn holandajn kantojn pri „la verda steleto“, akompanata de la gitaro kaj pri la Esp. paroladoj en la Londona „Hyde Park“. S-ino J. C. Isbrücker, la prezidantino, en koraŭtaj vortoj faris modelan Esperantan festparoladon pri D-ro Zamenhof, priskribante nian Majstron kiel genulon kaj homon. S-o F. C. Koens kantis per belega voĉo kelkajn holandajn kaj Esperantajn kantojn. Dum la paŭzo enskribis sin 23 partoprenantoj por nova daŭriga kurso. Inter la 115 ĉeestantoj ni ĝoje rimarkis reprezentanton el la Nederlanda parlamento.

Rumanujo.

En Arad la „Libera Liceo“ direktata de s-o Victor Babescu enprogramigis la instruadon de Esp. inter la ceteraj modernaj lingvoj. La kurson gvidatan de s-o prof. Ferenczy partoprenas 40 personoj. La malfermo okazis per propaganda prelego de s-ino Maria Bignio en la urba Kulturpalaco. Pro la sukceso meritis apartan dankon la rumana profesoro kaj s-o Zoltán Nagy, kiuj tre valore kunhelpis. — Finiĝis kurso gvidata de s-o Stefano Bartha.

En Galatz 31. dec. oni reorganizis la plej malnovan Esp.-societon en Rum.: „Unua Rumana Societo Esp-ista“. La nova komitato konsistas el: prez. s-o Toma Aburel, vicprez. s-o D-ro S. Kanner, sekr. s-o G. Schapira, kas.

Kian hararkoloron havis Zamenhovo? Kiom da Esperantistoj ekzistas en la mondo? Ĉu vi ne scias la adreson de mia korespondanto? Kian salajron havas kelnero en Usono? Kiel aspektas japana poŝtformo? Dek, cent demandoj sin sekvis. Mi palpis mian kapon. Ĉu mi estas freneza aŭ ĉu vi? Ĉi ĉion mi sciu? Sed mi ne havis tempon por mediti pri tio, ĉar jen aŭdiĝis terura ekkrako. Mi turnis la kapon. Ho, la ŝranko kun la „neaperontaj manuskriptoj“ ĵus renversigis kaj elkregis furiozaj formaĵoj kun kolere brilantaj okuloj.

„Fondu nian Literaturo!“ ili alkrigis al mi. „Ridinde vi kondutas, redaktoro. Vi nepre bezonas literaturajn manuskriptojn“ kaj nun, havante tiujn, vi enfermas nin en via malhela ŝranko. Represu nin, aŭ ni frakasos vian kranton!“

Kara Dio, kiel savi min?... Ho, ĉu ankoraŭ ne sufiĉas. Seriozaj sinjoroj staris antaŭ mi kaj rigardis min severe.

„Pro kio vi lasas insulti nian grupon en via gazeto? Kiel, nia grupo ne vivas? Oni nur babilas? Ĉu koncernas vin, kion oni faras en nia grupo. Zorgu pri viaj propraj aferoj!“

„Ankaŭ nin li insultigis, nin, la nuranojn.“ Kaj amaso da stelportantaj sinjoroj ŝovis sin minacante kontraŭ min.

„Oni entute ne povas kontentigi lin,“ daŭrigis pliaj novalvenintaj, „la nuranojn li malŝatas kaj samtempe li ofendas nin per sia skribiĵaĉo pri postsignoj de tro granda idealismo. Oni ne plu scias, kiel konduki en Esperantujo.“

„Ĉar vi estas frenezaj, entuziasmaj idealistoj. Rigardu nin, ni bazas sur realaĵoj, ni estas veraj Esperantistoj.“

Ho, ĉu denove aliaj? Fakte, sur la seĝoj, tabloj kaj aliaj mebloj ili staris kaj gestumis per

s-o M. Orna. Samtempe oni decidis organizi lokan grupon de la Protekta Komitato de la Rumanlanda Esp. Movado. — Esp.-Informejo instalita ĉe la kontoro de s-o M. Orna, Str. Lahovary n-o 12. La reorganizan kunvenon ĉeestis ankaŭ s-o H. Fischer, Lingvo-Komitato, kunfandinto de tiu socio.

En Petroŝeni, kurso por laboristoj gvidata de s-ano Francisko Lerch. — Kurso por lernantoj gvidata de s-o prof. J. Farkas.

En Sibiu „Internationale Sprachschule“ en-skribis Esperanton en la liston de la lingvoj instruotaj.

En Talmaciu (apud Sibiu), kurso por 65 lignolaboristoj, gvidata de s-ano Margareto Roth.

En Tighina (Besarabio) post sukcesa kurso ĉe la ŝtata liceo, gvidita de s-o David Grünberg, fondiĝis Esp. Rondo Amika kun 10 membroj, ĉiuj liceaj lernantoj, samtempe aliĝintaj al UEA. Prezid. de la Rondo estas s-o D. Grünberg, vicle kaj modele aganta Del. de UEA, Sekr. s-o I. Bauch VD. UEA.

En Cluj bonsukcesan Zamenhof-memorifeston gulis 16. dec. la samideanoj de Cluj, en la hejmo de la afable invitintaj familioj Gárdi kaj Payle. Dum la vespero pasigita en varma humoro paroladis s-o Engelmann pri la vivo de l' Majstro, pianludis artistino s-ino Eivtra Zsembery, parolis pri la interna ideo kaj deklamis propran poemon s-o T. Morariu. Kantoj de Esp-ista ĥoro kaj malstra deklamado de artisto s-o L. Löcsey el la poemoj de la Majstro kaj J. Baghy donis ĝuon valoran.

Cehoslovakujo.

En Dux fondiĝis Esp. Laborista Grupo. Parolado de s-o Guitmann pri „Esperantismo kaj laboristaro“.

En Languesst kaj Neudorf-Herrlich apud Dux kursoj de s-o Hauptvogel.

En Turn apud Teplitz-Schönau nova kurso. En Settenz apud Teplitz-Schönau nova kurso de prof. Murath-Dux.

En Hostomitz nova kurso de prof. Murath-Dux.

En Bardiov 7. jan. fondiĝis dank' al la klopodoj de s-oj policinspektoro Zdvoraček kaj D-ro Austerlitz la Esp. grupo „La verda stancardo“. La sukcesintan fondiĝfeston partoprenis 10 reprezentantoj de la najbaraj Prešov-aj samideanoj. Ĉeestis ĉirkaŭ 100 personoj, kiuj entuziasme aplaudis la belan kantadon de samideanino f-ino Róza Elmhorn kaj la salutparolojn de la gastaj samideanoj. Preskaŭ ĉiuj delegitoj el Slovakio sendis gratuletojn. Aklame estis salutata la kursestro D-ro Austerlitz, kiu per sia speciala instrumentado sukcesis, ke la 30 diverslingvaj kursanoj dum trimonata lernado akiris preskaŭ perfektan scipovon de Esperanto. Liaj lernantoj dediĉis al li belegan memorrajon.

